

Heinrich Heine,  
Belŝacaró

*tradukita de Richard Schulz*

Jam pasis de la nokt' duon'.  
Trankvile kuŝis Babilon'.

Nur supre en la reĝkastel'  
Fenestrojn traflagras torĉa hel'.

Reĝ' Belŝacar' de Babilon'  
Festenis en la festsalon'.

Tumultis laŭte de l' reg' sekvantar'.  
Tintigis pokalojn barbar' kun barbar'.

La reĝo aŭskultis obstine kun ĝu'  
La virojn jubili, pliiĝon de l' bru'.

Ekardas tre la reĝa vang'.  
Riskemas tre la reĝa lang'.

Kaj senpripense pekas li  
Kaj blasfemas terure, spitante al Di'.

Kaj paradas sen hont' kaj kun defi'.  
Aplaŭdas tre la koteri'.

Orgojle sonas de l' reĝ' ordon'.  
Jam hastas kaj revenas peon'.

...

Heinrich Heine,  
Belŝacar'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ripozis pace jam Babel'  
Dum meza nokto, en malhel'.

Nur supre en la reĝkastel'  
Vidiĝis flagre torĉa hel'.

Kun sia reĝ-kortegano'  
Festenis tie Belŝacar'.

Jen malplenigante pokalojn kun vin'  
De l' reĝ' servistaro amuzas sin.

Ĝojigis la reĝon de l' glasoj tintad'  
Kaj de la servistoj gajega kriad'.

La reĝo ardis pro la vin',  
La vino aŭdacigis lin.

Tentate de la aŭdacement'  
Li diras vortojn de blasfem'.

Senhonte la reĝo gloras sin,  
La servistar' aplaŭdas lin.

Vokite de l' fera reĝ'  
Servist' ekstaras de la seg',

...

Surkape pezas la ora vazar',  
El templo Javea la rab-akapar'.

Kaj ekprenis la reĝ' per krimea man'  
La plej sanktan pokalon kun fia rikan'.

Kaj li malplenigas ĝin ĝis la fund',  
Kriaĉas el malvirta abund':

„Javeo, mi mokas pri via kron' -  
Mi estas reĝo de Babilon'!”

Apenaŭ sonis for la vort',  
La reĝon ekkaptis la tim' de l' mort'.

La akra ridado formortis je l' hor'.  
Silentis tuj la vira ĥor'.

Jen vidu! el la blanka mur'  
Aperis homa mankontur'.

Kaj skribis, skribis sur la mur'  
Kaj ree foriĝis post flamgravur'.

Jen ankaŭ for regal-plezur'.  
Rigide rigardis la reĝ' pro terur'.

La viroj sidis mutaj pro tim'.  
Horor' sentiĝis en ĉies anim'.

...

Alportis li multon da ora ilar'  
Rabitan for de l' Javea altar'.

Kaj sanktan pokalon per peka man'  
Ekkaptis la reĝo, vokante: „Je l' san'!”

Kaj malplenigis li tiun ĉi,  
Kun buŝo ŝaŭmanta elvokis li:

„Jave', je eterno mi mokas vin, -  
Regant' de Babelo mi nomas min!”

Apenaŭ tion eldiris li,  
Ektimon sentis li en si.

Mutiĝis la rido en unu moment',  
De l' morto regis la silent'.

Kaj jen! Kaj jen! Sur blanka mur'  
de man' aperis la kontur';

Kaj skribis, kaj skribis sur la mur'  
Literojn el fajr' kaj foriĝis de sur.

Genu-tremante sur sia seĝ'  
kadavre pala jen sidis la reĝ'.

La korteganoj pro terur'  
Silente sidis, spiris nur.

...

Eĉ magoj ne sciis laŭ rita mezur'  
Klarigi la flamskribaĵon de l' mur'.

En tiu ĉi nokt', de la servistaĉar'  
Murdata estis Belŝacar'.

*Traduko de la Germana poemo "Belsazar" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-205-409 (2013-02-26 15:10:47)*

*Tiu traduko aperis en 1984 en la n-ro 61, 1984/7 de la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiun Richard Schulz, kiu nomis sin Rikardo Ŝulco, eldonis mem. Li indikis kiel aŭtoron de la germana-lingva originalo: Henriko Hajno. Tiu estas la germana poeto Heinrich Heine. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

La magiistoj vokitaj de li  
Ne povis klarigi tion ĉi.

Murdata estis Belŝacar'  
Samnokte de sia servistar'.

*Traduko de la Germana poemo "Belsazar" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-03-30.*

*MR-109-2 / Arg-205-408 (2004-03-10 11:49:13)*